

La Esperantisto.

Zeitschrift für die Freunde der Esperantosprache.

Herausgegeben unter der Mitwirkung des Dr. Esperanto (Dr. L. Samenhof) von Chr. Schmidt, Vorstand des Welt-sprachevereins in Nürnberg.

Erscheint monatlich einmal.

Zu bestellen auf der Post und in der Buchhandlung von Heerdegen-Barbeck in Nürnberg.

Preis 1 Mark für das Vierteljahr (durch die Post 1.15 Mk.).

Anzeigen werden angenommen zu 20 Pfennig für die Petitzeile.

Gazeto por la amikoj de la lingvo Esperanto.

Sub la kunlaborado de Dr. Esperanto (Dr. L. Zamenhof) eldonata de Chr. Schmidt, prezidanto de la klubo mondlingva en Nürnberg.

Eliras unu fojon en la monato.

Oni povas aboni sur la poŝto kaj en la librejo de Heerdegen-Barbeck en Nürnberg.

Kosto 1 marko por ¼ de jaro (per la poŝto 1 marko 15 pf.).

Anoncoj estas akceptataj por 20 pfenigoj por la petitlinio.

Nr. 5.

Nürnberg, 25. Februaro 1890.

1. Jahrgang.

Esperantistoj-vastigantoj*).

Pasis jam du jaroj de la momento kiam nia kara „Internacia“ montris sian vizaĝon al la publiko. Ĝi iris en la mondon, trovis multajn amikojn, kiuj akceptis ĝin kun entuziasmo kaj sekvas kun la plej granda intereso ĉiun ĝian paŝon. Juĝante laŭ la plaĉo, kiun la lingvo trovis ĉie, kien ĝi venis, oni povus esperi, ke ĝi baldaŭ vastiĝos en la tuta mondo kaj la espero de d-ro Esperanto jam post kelkaj jaroj efektiviĝos tute plene kaj brilante. Sed bedaŭrinde ĝis nun la afero malproksime, malproksime ankoraŭ ne tiel vastiĝis kiel ĝi devus. La afero progresas kvankam konstante kaj senhalte, sed tre malrapide. La tempo faros la sian; sed ne ridu kaj ne koleru sinjoroj, se mi diros, ke mi estas egoistino kaj mi volus ke la bela sonĝo de l' homaro efektiviĝu ankoraŭ en la tempo de mia vivo.

Kie kuŝas la kaŭzo de la ne sufiĉe rapida progresado de nia kara afero? Ĉu per la certa nombro de la ekzistantaj Esperantistoj jam tute finiĝis la nombro de la idealistoj, al kiuj nia afero povus plaĉi kaj kiujn ĝi povus entuziasmigi? Ĉu ekster la ekzistanta nombro de niaj amikoj nia afero jam renkontas ĉie indiferentecon aŭ malestimon? Ne, certe ne kaj tute ne! Juĝante laŭ la ekzemploj -kiujn mi vidis, mi povas diri tute certe, ke en la mondo ekzistas ankoraŭ milionoj, kiuj kun granda plezuro en unu tago aliĝos al nia afero, se... scius pri ĝi, se oni parolus kun ili, se oni klarigus al ili la tutan grandan signifon de nia sankta afero.

Antaŭ kelkaj monatoj mi estis en unu granda urbo. Mi okaze demandis mian tian konaton, kian opinion li havas pri la lingvo internacia Esperanto. „Kia Internacia? kia Esperanto? kio tio ĉi estas?“ li demandis min mirante! Mi demandis alian konaton, — tiu sama demandanta vizaĝo. Mi iris al libristo, volante aĉeti lernolibron de nia lingvo por montri al miaj konatoj. „Esperanto?!“ diris la libristo, — „kio tio ĉi estas? mi neniam aŭdis“. Mi iris al dua, al tria, al ĉiuj libristoj en la urbo, — ĉie tiu sama mirigita balancado de l' kapo. Kun malĝojo mi skribis la miran fakton al la aŭtoro de la lingvo internacia kaj demandis lin, ĉu eĉ unu persono en tiu urbo scias ion pri nia afero. „Estimata sinjorino“, li respondis al mi, „en la urbo K* ekzistas kelkaj personoj, kiuj ricevis la gramatikon kaj fariĝis amikoj de nia afero ankoraŭ antaŭ unu jaro; sed, se la memoro min ne trompas, mi de tiu tempo ne ricevis eĉ unu letereton, eĉ

*) Sub tiu ĉi titolo ni ricevis artikolon, pri kiu ni ne povas ankoraŭ diri nian finan opinion; sed plenumante la deziron de la estimata aŭtorino ni prezentas la artikolon al niaj legantoj. La red.

unu „promeson“, eĉ unu signon de vivo el tiu urbo“. Jam tiam mi komprenis, ke la amikoj en K ne estas kredeble la solaj, kiuj dormas. En la No. 2 de la Esperantisto, inter la „Respondoj al la amikoj“ mi legis la respondon al s-ro J-v en T* kaj mi diris al mi mem: „Aha, kredeble la amikoj en K* en sia dormado ankaŭ atendas, ke ni venu el ekstere propagadi la aferon en ilia urbo!“ Kia malĝoja fakto! Se el cent amikoj de nia afero unu laboros kaj naŭdek naŭ dormos, — kiel do malrapide iros nia afero! La kaŭzo de la ne sufiĉe rapida progresado de l' afero estas la dormado de ĝiaj amikoj. Oni devas necese elserĉi ian vojon por fari nian aferon pli konata kaj pli vastigita en la mondo. Tio ĉi estas la plej grava, mi ripetas — la plej la plej grava celo, kiun niaj amikoj devas havi antaŭ siaj okuloj. Se tio ĉi estos farita — ĉio alia baldaŭ fariĝos per si mem. Se la nombro de la personoj, kiuj ellernis la lingvon Esperanto estos tre granda, tiam la plej grava celo de la lingvo esti komprenita inter la popoloj estos jam atingita, tiom pli ke se ni atingos nur la unuan centon da miloj, tiam la dua cento alvenos jam multe pli rapide, kaj se ni atingos kelkajn milionojn, — tiam la tuta alia mondo en unu semajno aliĝos al ni jam el kaŭzoj pure egoistaj. Se la nombro de la Esperantistoj estos granda, tiam nia literaturo jam per si mem tre baldaŭ grandiĝos kaj ĉiam pli grandiĝados; ĉar ĉe granda nombro da legantoj jam per si mem (el celoj pure realaj) baldaŭ troviĝos multaj verkantoj kaj eldonantoj, kaj ju pli granda estos la nombro de la Esperantistoj, des pli rapide kreskos la literaturo, tute sen subteno kaj helpo materiala — tiel same kiel ju pli granda estos ia popolo, des pli granda estas ĝia literaturo, kvankam neniu ĝin subtenas. Ĉe granda nombro da verkantoj la lingvo rapide riĉiĝos, ellaboriĝos, konstantiĝos kaj elegantigiĝos. Kiam la nombro de la Esperantistoj estos jam sufiĉe granda kaj faros jam tutan popolon, en kiuj sin trovos personoj de ĉiuj nacioj, klasoj kaj rangoj, tiam baldaŭ facile fondiĝos efektive internacia, efektive kompetenta kaj efektive aŭtoritata akademio, kiu trarigardos la konstruon de la lingvo kaj zorgos pri ĝia plibonigado (cetere mi estas konvinkita, ke eĉ sen akademio, jam per la praktika uzado mem, la lingvo iom ŝanĝiĝos, ebeniĝos kaj plibonigiĝos, kiel ni ĝin vidas en ĉiuj lingvoj naturaj), dum se fondiĝos akademio jam nun, kiam la nombro de niaj amikoj ne estas ankoraŭ sufiĉe granda, ĝi tute ne estos ankoraŭ kompetenta kaj aŭtoritata, ĝi enkondukos malpacon kaj malkonsenton de opinioj, kiuj detruos baldaŭ nian tutan aferon dum ĝi ne staras ankoraŭ en la mondo sur tute fortaj piedoj; kaj se nun nia afero falos, la publiko perdos ĉian konfidon al la ideo mem, kaj — adiaŭ

por eterne bela sono de l' homaro! Per unu vorto — miripetas kun la plej profunda kaj plena konvinko la opinion, kiun iam skribis al mi la iniciatoro de nia afero: ni devas antaŭ ĉio kaj per ĉiuj niaj fortoj zorgi pri la vastigado de la afero kaj pri la konstanta kaj rapida grandigado de la nombro de la personoj, kiuj ellernis nian lingvon. Ĉio alia venos baldaŭ rapide, certe kaj sendaŭgere per si mem. „Granda, plej grandega nombro da lernantoj!“ devas esti skribita sur nia standardo. Se ni tion ĉi ne havos, ni nenion havos. Kion ajn ni faros, kiel ajn ni laboros, — la trovado de novaj amikoj devas esti la unua laboro de ĉiu el ni. Se ni tion ĉi ne forgesos, ni baldaŭ vidos nian belan songon efektivigitan antaŭ niaj okuloj; sed se anstataŭ labori kaj serĉi novajn amikojn ni nur babilados, — ni baldaŭ starigos la krucon sur niaj esperoj.

Kie serĉi la kaŭzon, pro kiu multaj el niaj amikoj dormas, plivolante vidi kiel aliaj vastigas la aferon, ol vastigi ĝin mem? Mi pensas, ke ekster la natura maldiligenteco de multaj homoj, la kaŭzoj estas:

1) multaj ne scias kiel ili devas labori;

2) multaj volas fari multegon per unu fojo; kaj vidante ke tio ĉi ne iras, kaj sentante, ke se ili alportos nur kelkajn novajn amikojn, ĝi estos kiel guto en la maro, — ili nenion faras.

Tial ni devas elserĉi rimedon por ke ĉiu sciu unu fojon por ĉiam, kion li devas fari por esti utila al nia afero kaj por esti konvinkita, ke lia laboro, kiel ajn malgranda ĝi estos, ne estos perdita, sed alportos difinitan gravan frukton, kiu restos fortike, konstante kreskos kaj multobliĝos. Jam multe pli frue venis al mi en la kapon unu rimedo, kiun mi tamen ne volis elparoli, timante ke oni min ridos. Sed nun, leginte la „Respondojn“ en la „Esperantisto“, mi venis al la konvinko, ke mia propono eble povas esti utila, kaj mi decidiĝis prezenti ĝin al niaj amikoj. Mia propono estas:

Ni devas fondi ligon de „vastigantoj“ (t. e. de personoj, kiuj vastigados nian aferon en la mondo). Ĉiu kiu volas fariĝi membro de tiu ĉi ligo, devas nek pagi ian monon, nek plenumi iajn apartajn formalajojn, nek ligi sin por ia konstanta laboro, — li devas nur sendi al la iniciatoro de nia afero, aŭ al la redakcio de la „Esperantisto“, aŭ al la ĉefo de la ligo, se la ligo poste iun elektos, — la sekvantan leteron propramane skribitan:

„Mi, subskribita, ellernis la lingvon Esperanto kaj mi sankte promesas, ke mi pli malfrue ol post 3 monatoj de hodiaŭ mi alportos al la lingvo Esperanto 2 novajn „amikojn vastigantojn“ (t. e. personojn kiuj sendos tian saman leteron, kiel mi sendis).

Dato:

Subskribo:

Plena adreso:

„Mi estis altirita al nia afero de sinjoro ,
 „kiu estas enskribita en la libro de la vastigantoj sub
 „la Nr.

Lau la mezuro de envenado de tiaj leteroj la ĉefo de la ligo enskribas kaj presas la nomojn de la novaj amikoj en la ordo, en kiu ili venas, aldonante al ĉia nomo la respondan numeron, la adreson, la daton, kiam la letero venis, kaj la numeron de la persono, de kiu la nova amiko estis alvarbita. Ĉe tia publika enskribado ĉiu povos ĉiam kontroli, kiu el la amikoj plenumis sian promeson kaj kiu ĝin ne plenumis.

Per tia maniero ĉiu el niaj efektivaj amikoj havos nur tre malgrandan laboron por fari: li devos nur unu fojon en sia vivo eltrovi 2 novajn amikojn vastigantojn, kaj poste li jam povas dormi kaj tute forgesi la aferon, estante tute certa,

ke li kun pura konscienco plenumis sian tutan devon por la afero kaj ke lia farita laboro alportos riĉajn fruktojn. Se ĉe neniu el niaj amikoj faros ion pli por nia afero, kaj se la nombro de la personoj, kiuj enskribiĝos en la ligon estos tre malgranda, sed se nur ĉiu plenumos sian publike donitan kaj tre facile plenumeblan promeson, tiam ni jam povas esti tute certaj, ke baldaŭ la nombro de la Esperantistoj kreskos kun fulma rapidego; ĉar unu sola amiko post 3 monatoj turniĝos en 3, post 6 monatoj li turniĝos en 7, post unu jaro li turniĝos en 31, kaj post 5 jaroj unu sola amiko turniĝos en preskaŭ 2000000! kaj se la nombro de la amikoj vastigantoj nun estos 50, ĝi post 5 jaroj estos 100000000! Kaj por atingi tian miregan rezulton kion ni postulas de niaj amikoj? preskaŭ nenion! ili ne devas al si rompi la kapon pri tio, kion ili devas fari, ili ne devas eterne memori kaj labori, — ili devas nur plenumi sian vorton, kiun plenumi estas ja tre facile, tiom pli ke la malgranda laboro devas esti farita nur unu fojon en la vivo kaj por tio ĉi ili ankoraŭ havas la tempon de 3 monatoj!

Mi scias ke en la vivo ĉe ebla estas preciza matematiko; kredeble sin trovos personoj kiuj el maldiligenteco kaj facilaniĝeco ne hontos rompi sian promeson; kredeble sin trovos personoj, kiuj estos tiel malfortaj kaj tiel neelokventaj, ke malgraŭ ĉiuj siaj laboroj ili ne povos eltrovi du novajn amikojn; sed por tio kredeble sin ja trovos multaj aliaj, kiuj alportos al la afero pli ol 2 amikojn, kaj tiel la manko eble elebeniĝos; kaj se la afero eĉ iros iom pli malrapide, ol ĝi estas matematike elkalkulita, la rapideco ĉiam estos ankoraŭ sufiĉe granda. En la komenco, dum en ĉiu loko ekzistas ankoraŭ grandega nombro da personoj, kiuj ne aliĝis al nia afero nur pro simpla nesciado pri ĝi, la varbado certe iros tre facile. Post kelka tempo (tiun ĉi riproĉon oni faros al mia projekto), kiam ĉiuj personoj facile altireblaj jam estos altiritaj, la varbado iros tre malfacile. Ĝi estas vero; sed ni ne devas ankaŭ forgesi, ke tiam nia afero jam staros tiel forte kaj gloro, ke la plej granda parto de tiuj personoj, kiuj nun apartenas al la indiferentaj kaj nealtireblaj, tiam estos altiritaj tre facile per la gloro mem de la afero. Cetere mi pensas, ke se mia projekto en la vivo sin montros ankaŭ ne tiel utila kiel mi kredas, ĝi en ĉiu okazo malutilon alportos nenian, kaj estas inde ke oni faru la provon. Mi prezentas mian proponon al la juĝo de niaj amikoj kaj mi petas, ke ĉiu leganto de la „Esperantisto“ sendu al la redaktoro sian opinion pri mia propono. Se oni trovos, ke mi estas prava, mi estos ĝoja, ke mi alportis mian ŝtoneton al nia konstruo; se mi eraras, mi petas pardonon.

La justeco postulas aldoni, ke la unuan puŝon al mia ideo donis la proponitaj „promesoj“ de d-ro Esperanto. Sed, ne ofendante la aŭtoron mi devas konfesi, ke la plano de la „promesoj“ jam en la komenco al mi ne plaĉis; ĉar mi sciis, ke timante la grandegan nombron (sen kiu ĉia aparta „promeso“ havas nenian signifon) multaj ne sole ne alsendos ilian promeson, sed rigardos eble kun malkonfido la tutan aferon; en mia projekto, kontraŭe, nenio timiĝos, ĉar ĉiu vidos, ke li havas antaŭ si nur malgrandan laboron, por ke lia konscienco jam estu pura, kaj lia laboro en nenia okazo perdiĝos; ĉar se la tuta plano eĉ sin montros nepraktika, en ĉia okazo la nombro de la amikoj, kiujn ni atingos per ĝi, kiel ajn malgranda ĝi estos, — ĉiam estos gajnita. La „promesoj“ de d-ro Esperanto havas ankoraŭ tiam neoportunecon, ke ili estis kalkulitaj por la okazo, se jam la tuta mondo scios pri la ekzistado de nia afero (tiam ili eble estus bona rimedo); sed kiel atingi ke la tuta mondo sciu pri la afero — por tio ĉi estis donita nenia rimedo.

Olga L.

S. Petroburgo, 1. Februaro. Ĉar ja kredeble la proponita ligo aŭ akademio baldaŭ efektiviĝos, mi diros ankaŭ mian penson pri ĝi kaj pri ĝia farinda organizacio, kvankam entute mi estas kontraŭ tia fariĝo. Oni bezonas nur trarigardi la unuan kajeron de l'adresaro, kiu proksimume montros la proporciojn de l' vastigado de nia lingvo, kaj oni tuj ekvidos, ke preskaŭ ĉiuj promesintoj estas rusoj; la alilandajn oni povas eknombrigi je la fingroj; ili estas entute 69 inter 1000. Tio estas 7 procentoj. Oni do ne povas fari kongreson el 93% rusoj kaj 7% el ĉiuj aliaj landoj kune. Kaj aliflanke oni ne povas reprezenti ĉiujn landojn per egala nombro da voĉoj. La akademio aŭ kongreso povas nur montri la necesajn ŝanĝojn, sed praktike ili estos farataj nur de la verkistoj en tiu ĉi lingvo, ili estos eble en kelkaj punktoj komence malkonsentaj, sed baldaŭ la plej bona formo estos akceptata ankaŭ de la aliaj. La verkistoj — jen la vera akademio. Oni vidas, kian babilonan konfuzon faris la volapŭka akademio kun siaj ŝanĝoj. La ŝanĝoj, kiuj estos farataj de la verkistoj transformigos la lingvon nature kaj nerimarkeble (tion pli ke la verkistoj estas la plej bone sciantaj la lingvon) tiel, kiel ŝanĝigas la vivantaj lingvoj. Dume ia leĝo, diktita de la akademio, trovos multajn kontraŭistojn, eĉ en la akademio mem, ne parolante jam pri multaj aliaj personoj, kiuj eĉ ne donis sian voĉon al ia ŝanĝo, ĉar demandi la voĉon de ĉiuj estas tute neeble kaj eĉ ne rationale, ĉar multaj tute pasive sin tenas je la afero, kvankam ili donis eble sian promeson. — Jen estas mia penso pri tiu ĉi afero; sed por la okazo ke la akademio efektiviĝos mi prezentas al la trarigardo jenan projekton.

1) La membroj de la akademio aŭ ligo estas apartaj personoj (mi ilin nomos pro mallongeco akademianoj) kaj kluboj esperantaj.

2) Neoficialaj rondetoj de esperantistoj, kiuj pro iaj kaŭzoj (politikaj, socialaj, aŭ personaj) ne povas formi klubon en sia urbo, tamen, estantaj inter si en rilatoj, estas rigardataj kiel kluboj, se ili prezentas al la akademio folion kun iliaj subskriboj (ne malpli ol 10) kaj nomos sian reprezentanton.

3) Estas utile ke la akademio enhavu ankaŭ homojn, kiuj energie laboras por la lingvo kaj estas konataj en nia afero, se eĉ ili apartenas al neniu klubo. Tial estus bone se la amikoj proponus ĝis ia nomita termino la homojn (virojn aŭ virinojn), kiuj laŭ ilia juĝo estus indaj esti elektitaj en la akademion, kaj tiam oni elektus inter la kandidatoj.*)

4) Tiuj akademianoj, ne estantaj reprezentantoj de kluboj, devas obei al jenaj kondiĉoj. Ili devas esti plenkaj, instruitaj science kaj filologie, kaj koni almenaŭ 3 el la plej gravaj eŭropaj lingvoj, inter ili du el jenaj: franca, angla, germana, latina.

5) La reprezentantoj de kluboj aŭ rondetoj ne bezonas havi tiujn ecojn, ĉar ili devas anonci ne sian propran juĝon, sed tion kion decidis la klubo.

6) La kluboj estas eternaj membroj de l'akademio, la akademianoj estas elektataj por ia tempo, ekzemple por unu jaro, post kio oni ree elektas.

7) Kia persono funkcias kiel reprezentanto de ia klubo, estas tute egale, sed en ĉia ŝanĝo la klubo devas sciigi la akademion pri l'adreso de sia nova reprezentanto.

8) Ĉiu membro de l' akademio enportas ian monatan aŭ jaran pagon ekzemple 1 markon germ. monate.

9) Ĉiu eldonanto de ia libro estas petita sendi por ĉiu 1000—50 ekzemplerojn al la akademio, kiu uzos ilin al sia utilo.

* Ni petas ĉiujn amikojn de nia afero proponi al ni ĝis 1. April 1890 personojn, kiuj laŭ ilia juĝo estas indaj elektitaj en la akademion.

10) La interna organizacio de la kluboj estas egala, sed ili donas sian voĉon laŭ ilia graveco. Ĉiuj 20 personoj en la klubo havas unu voĉon en la akademio, ekzemple klubo el 53 membroj havos 3 voĉojn. Por ĉiu voĉo la klubo pagas unu membran pagon. Tiel la dirita klubo de 53 membroj enportus monate 3 germ. markojn.

11) Personoj ne havantaj klubon aŭ rondeton en sia urbo povas sin enskribi en ia klubo en alia urbo.

12) Ĉiuj aferoj, tuŝantaj kiel la lingvon tiel la internajn demandojn de l' konstruado de l' akademio mem, estas decidataj de la plejmulto de voĉoj, en egaleco decidata la voĉo de l' prezidanto.

13) La akademio elektas jenajn personojn administrativajn: prezidanton, viceprezidanton, kasiston: sekretarion kaj redaktoron de l' akademie centrala gazeto.

14) La prezidanto ne povas esti viceprezidanto, kasisto kaj sekretario. La viceprezidanto ne povas esti kasisto.

15) La akademio devas havi ian organon, en kiu ĝi anoncas al ĉiuj membroj 1) projektojn, 2) protokolojn de l' aferoj, de l' voĉdono kaj cetere, 3) kalkulon de l' enspezoj kaj elspezoj, 4) artikolojn priparolantajn iajn proponojn. La pago ne devas esti tro granda. Estus bone se tiu ĉi gazeto elirus pli ol unu fojon monate, se eĉ nur en malgrandaj folioj. La gazeto ne devas havi ian difinitan grandecon, sed presi ĉion, kio estas ensendata al la akademio ĝis la komenco de presado de nova numero.

E. de Wahl.

Novajoj.

Tre grandan utilon alportas al nia afero tiuj amikoj, kiuj disdonas aŭ dissendas en granda nombro la malgrandan vortareton de nia lingvo. Tio ĉi estas tre facila, bona kaj nemultekosta rimedo de propagado, kaj ni ĝin ripete rekomendas al ĉiuj amikoj de nia afero. La plej granda parto de la dissendataj vortaretoj sendube perdiĝos sen utilo; sed multaj falos en bonan teron kaj donos frukton. Eĉ la ekzempleroj ŝajne perdataj ne tute tamen perdiĝos kaj donos ankoraŭ iam frukton, kiel la sperto jam kelkfoje montris. Se Vi timas, ke unu persono ricevos kelkajn ekzemplerojn de kelkaj diversaj flankoj, ĝi ja ankaŭ ne malutilos: ĉar se la unu ekzemplero restis sen rezultato, la dua aŭ la tria povas doni bonan rezultaton, aŭ la ekzemplerojn superflujajn la adresato disdonos al aliaj personoj. La nomojn de la personoj, kiuj venigas por disdonado aŭ dissendado ne malpli ol 25 vortaretojn per unu fojo, ni ĉiam donados en nia gazeto. En la lasta tempo venigis: s-ro W. H. Trompeter el Schalke (Westfalen) 100 vortaretojn; s-ro A. Grabowski el Ivanovo-Voznesensk 100 vortaretojn; s-ro E. Nefedov el Tjumen 50 v.; s-ro A. Dombrowski el Ustjujna 50 v.; s-ro A. Zinovjev el Charkov 33 v.; s-ro N. Halla el S. Peterburg 33 v.

La kajero 1^a de la „Adresaro de la personoj kiuj ellernis la lingvon Esperanto“ eliris el la presejo kaj estas jam dissendita al la abonintoj.

Sinjoro E. de Wahl skribis artikolon pri nia lingvo en la „S. Petersburger Zeitung“. En tiu ĉi artikolo, kiel ankaŭ en sia artikolo en la gazeto „Denj“, s-ro Wahl donas sian adreson kaj sciigas ke li kun plezuro respondos pli vaste al ĉiu, kiu volas konatiĝi pli proksime kun nia afero. Ni trovas tion ĉi tre bona; ĉar se iu skribas artikolon en gazeto sed ne montras al la legantoj, kiel ili povas konatiĝi kun la afero pli proksime, la artikolo tiam ofte restas sen rezultato.

Respondoj al la amikoj.

Al la abonantoj. La mono por la gazeto „La Esperantisto“ devas esti sendata ne al mi, sed rekte al la redaktoro eldonanto (Adreso: Herrn Chr. Schmidt, Spittlerthorgraben 33, Nürnberg). Anstataŭ mono germana oni povas sendi ankaŭ monon de ĉia alia lando kaj ankaŭ signojn de poŝto. Se iu ne ricevas, la gazeton akurate, li devas sin turni ankaŭ rekte al la redaktoro.

L. Z-f.

Pri la nova ortografio. Multaj plendas, ke la skribado per ĉ, ĝ, k, ĵ, ŝ kaj ŭ estas por ili neoportuna kaj malhelpas ilin ankau en la presado de verketoj en iliaj lokoj, kie la presejoj ne havas la leterojn kun signetoj. Ni ripetas tial tion, kio estis jam dirita en la „Aldono al la Dua Libro“: anstataŭ la signeto superlitera oni povas kuraghe uzadi la literon **h** kaj anstataŭ **ŭ** — simplan **u**. Por pli alkitimigi la legantojn al la nova ortografio, ni de nun chiam presados unu parton de la gazeto per la nova ortografio. Lau tiu chi nova ortografio ni nun chiam presados en la gazeto la versojn kaj la Respondojn al la amikoj.

L. Z-f.

Pri la adresoj. Granda nombro de niaj amikoj ghis hodiaŭ ne sendis ankoraŭ al la aŭtoro ilian nomon kaj adreson. Tial ghis hodiaŭ en la „Adresaro“ mankas ankoraŭ la nomoj de multaj niaj amikoj (aparte ekster Rusujo). Ni ripetas nun per la gazeto nian peton, ke chiuj; personoj, kiuj ellernis la lingvon Esperanto kaj konsentas, ke oni skribu al ili en tiu chi lingvo, devas sendi ilian nomon kaj plenan adreson al la aŭtoro de la lingvo Esperanto (Adreso: Dro L. Zamenhof en Cherson, Russie). Estas tre grave, ke la nomoj de chiuj niaj amikoj sin trovu en la „Adresaro“, tre grave por nia afero kaj ankau por la diritaj personoj mem.

L. Z-f.

Al kelkaj senkuraghaj Esperantistoj. Ne sen intereso por Vi eble estos la jena letero de unu el niaj amikoj: „En la komenco mi vane penis trovi en nia urbo amikojn por nia afero; chie mi renkontis rifuzon, kaj post kelkaj malfelichaj provoj mi jam perdis la kuraghon kaj chesis labori, konstante min per la opinio, ke la mondo, ne estas ankoraŭ matura por nia afero kaj ni devas atendi pli bonan tempon. Sed post kelka tempo mi faris ankoraŭ unu provon kaj ghi prosperis al mi trovi unu amikon por nia afero. Kune kun tiu chi nova amiko mi nun iris al mia unua rifuzinto kaj ni komencis denove la parolon pri la lingvo Esperanto. Vidante nun ke mi jam ne estas la sola malsaghulo en nia urbo, la dirata persono denove tralegis la broshuron, pripensis ghin pli serioze kaj farighis baldau ankau varma amiko de nia afero.“

L. Z-f.

Al s-ro S. en Kiev. Ofte Vi ripetas pri la maloportuneco de la artikolo „la“. Sed la artikolo estas ja vorto tute aparta kaj sur la konstruon de la frazoj ghi havas nian influon; tial, se Vi volas, Vi povas tute ghin ne uzadi, almenaŭ ghis la tempo kiam Vi tute bone scios ghian signifon.

L. Z-f.

Al s-ro A. F. en Saratov. En la traduko de la rusa nacia

himno la esprimo „estu timata“ estas uzita tute bone kaj regule. En la rusa lingvo la vorto „timi“ ne havas pasivon, sed tio chi ja tute ne montras ankoraŭ ke ankau en Esperanto ghi ne devas havi pasivon. En chiu vivanta lingvo estas permesita uzi nur tiujn formojn, kiujn aliaj personoj jam uzis antau Vi; sed en la lingvo internacia oni devas obei sole nur la logikon. La logiko diras, ke chia verbo povas havi pasivon, se nur la senco ghin permesas. Sed en la verbo „timi“ la senco tute bone permesas pasivon, kiel en aliaj verboj. Che la timado ni havas chiam du personojn au objektojn: unu, kiu timas, kaj unu, kiun oni timas, au kiu estas timata. „De l'malamikoj Vi estu timata“ signifas: ke la malamikoj timu Vin (= je Vi au antau Vi). Vere ke en la rusa lingvo oni diras ne „timi lin“, sed „timi de li“; sed tio chi estas aparteco de la rusa lingvo, kiu tute ne estas deviga ankau por chia alia lingvo. Jam la senco mem permesas tute bone uzi la verbon „timi“ kun la akuzativo (en tia maniero ghi ankau estas uzata en multaj lingvoj, kie ghi tiel ankau havas pasivon); sed se la senco ghin ankau ne dirus, ghin diras ja tute klare nia gramatiko, lau kiu en chia duba okazo oni povas uzi la prepozicion „je“ au la akuzativon sen prepozicio. Ech de vortoj, kiuj per si mem ne postulas la akuzativon, Vi povas en nia lingvo libere chiam fari pasivon, se nur la senco de tiu chi pasivo estos komprenebla. Tiel ekzemple en la versajho „Al la Esperantisto“ estas ne malregule uziti la esprimo „la celo estos alvenita“ (= oni alvenos al la celo). Tiel Vi vidas, ke la amikoj el Moskvo esprimis sian penson tute bone kaj tute ne malpatriote.

L. Z-f.

Al s-or Rijkod en V. Mi dankas bonkore al Vi por Via laboro; ĝi estas tute bona traduko; sed bedaŭrinde ni ne povas ĝin uzi jam nun. Kun kora saluto. /ro /z

Al F. Ve. Lorenz en J. Kun plezuro mi legis Viajn poemojn. Koregan dankon kaj saluton. /s-ro

Al s-ro Sirotin en Kiew. Mi ricevis kun danko Vian projekton de regularo por tutmonda ligo de Esperantistoj. Kun korega saluto.

Al s-ro Morignoni en Crema. Mia filo estas tre dankema al Vi por la senditaĵo. Ĉu Via lernolibro eliris jam? Saluton. /a

Al s-ro P. Poletti en Amoy (China). Ĉu vi ricevis la gramatikon por Angloj? Sciigu min, ĉu la lingvo Esperanto plaĉas al Vi. Koran saluton.

Al s-ro R. Geoghegan en Birkenhead. Mi atendas senpacience sciigon de Vi. Koregan saluton. /ea

Al s-ro J. Ferreira en Lisabon. Sendu al mi la eldonitan gramatikon por Portugaloj. Saluton internacian.

Al s-ro A. Fr. Rundstedt en Wedum. Sendu baldau al mi Vian manuskripton. Kun alta estimo.

Al s-ro Demonget en Paris. Ĉu Vi legis la gazeton „Interpretor“? Kun saluto internacia.

J. F. Schn. en Ober-Döbling. Kun granda malĝojo mi legis la sciigon, ke Vi estis malsana je la influenco. Espereble Vi nun povas ree esti tute kontenta pro Via saneco. Kun frata saluto.

Anoncoj.

La presejo de W. Tümmel
en Nürnberg,

G. Zechmeyer en Nürnberg.

Plej granda komerco de la poŝtsignoj.
Ĉiuj kasitaj poŝtsignoj estas aĉetataj kaj ŝangataj.
Alle gebrauchten Briefmarken werden gekauft und umgetauscht.

Senpage instruas la lingvon Esperantan
Vladimir Vladimiroviĉ de Majnov en S. Peterburg. /c

Tabellarische Uebersicht*)

der Grammatik und Wortbildung der Esperantosprache.

Damit der Leser von dem wohlgedachten Aufbau der internationalen Sprache ein klares Bild gewinnen und von der beispiellosen Einfachheit derselben sich selbst überzeugen kann, geben wir nachstehend eine übersichtlich geordnete Darstellung der Grammatik und Wortbildung, deren Kenntniss jeden Gebildeten vollkommen befähigt, jede in unserer Sprache verfasste Schrift mit Leichtigkeit lesen und verstehen zu können.

I. Aussprache und Orthographie.

1. Vokale: a, e, i, j, o, u¹⁾

. Konsonanten:

a) Dieselbe Aussprache wie im Deutschen haben:
b, p, d, t, f, g, k, h, l, m, n, r, s²⁾

b) abweichend von der in der deutschen Aussprache
lauten:

- c wie z, z. B. citrono wie zitrono (Zitrone)
- z wie s, z. B. kauzo wie kauso (Ursache)
- v wie w, z. B. vento wie wento (Wind)
- ĉ wie tsch, z. B. ĉevalo wie tschevalo (Pferd)
